

# BARTOLOMĚJ DANIEL (1924 – 2001), la esperantisto



Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 1an de aprilo 2026

Hodiaŭ estas la 1an de aprilo 2026 kaj post unu semajno, la 8an de aprilo, romaoj solenos sian Internacian Romaan Tagon. Ili ĝin solenas por memorigo de la kongreso en Orpington apud Londono (**la 8an de aprilo 1971**), kie reprezentantoj de romaoj el 14 ŝtatoj, inkluzive de tiama Ĉeĥoslovakio, akceptis la nomon **romaoj** (anstataŭ “ciganoj”), romaan himnon kaj romaan flagon.

Enkadre de solenoj de Internacia Romaa Tago la 6an de aprilo 2022 en parko Lužánky en Brno okazis ligado de rubandoj sur Arbon de Tolereco. Ankaŭ mi en tiu agado partoprenis kaj ĉar mi estas esperantisto, sur la arbon mi ligis verdan rubandon. Tiam mi konatiĝis kun d-rino Jana Horváthová, direktorino de Muzeo de Romaa Kulturo en Brno kaj aŭtorino de la libro “Ĉapitroj el Romaa Historio”.

Trarigardinte muzean ekspozicion “Historieto de Romaoj”, mi ŝin demandis: “Ĉu vi scias iun romaan esperantiston?”

“Jes, esperantisto estis sinjoro Daniel. Sed li apartenis al pli maljuna generacio ol vi. Li nin instigis lerni esperanton.”

Romao, kiu estis edukita, lernis kaj propagandis esperanton, estis mirinda elstarulo. Sed inter esperantistoj de ĈR nekonata. Pro tio mi eksekvis spurojn de Bartoloměj Daniel, romaa esperantisto.

Bartoloměj Daniel naskiĝis **la 17an de oktobro 1924** en Šaštín (okcidenta Slovakio, hodiaŭ Šaštín-Stráže en distrikto Senica).

Li havis ses gefratojn (4 fratojn kaj du fratinojn), sed plimulto el ili baldaŭ forpasis. Lia patro, kiu dum sia junaĝo servis en aŭstro-hungara armea muzikistaro en Vieno kiel sarĝento, estis forĝisto, poste komunuma salajrulo, kiu gajnis 600 kronojn por monato. Lia patrino laboris ĉe bienmastroj, purigis, lavis, fabrikis kaj vendis penikegojn el porkaj haregoj, eĉ ekspluatis kaj vendis sablon. Tiu laboro kaj nesalubra vivmedio kaŭzis ŝiajn malsanojn. Ŝi suferis de grava reŭmatismo. Laŭ rememoroj de Daniel ŝi havis siajn palmojn kaj fingrojn tiel multe torditajn, ke ŝi ne kapablis ilin disetendi.

Sed en kiaj vivkondiĉoj Bartoloměj Daniel naskiĝis?

Sendube antaŭmilita Ĉeĥoslovakio (1918 – 1939) estis demokrata ŝtato, sed **kontraŭromaa leĝo el la jaro 1927** estis kruela kaj krom Bavario ĝi nenie en tiama Eŭropo havis analogion.

Romaoj, same kiel iuj ajn vagantoj (§ 1), devis esti tenitaj en registro (§ 2), por konstataj de iliaj identecoj oficistoj povis fari antropometriajn, daktiloskopajn kaj aliajn ekzaminojn kaj mezuradojn (dum 14 tagoj romaoj devas resti en unu loko, § 3), ĉiuj romaoj devis porti ciganajn identigilojn (§ 4), por nomadado ili bezonis nomadajn dokumentojn (§ 5), ili devis porti neniujn armilojn, municion kaj

eksplodaĵojn (§ 6), ne plu romaoj ol unu familio povis kune nomadi (§ 7), ili povis tendumi nur en difinita loko (§ 8), eksterlandaj romaoj bezonis permeson de ministerio de internaj aferoj (§ 9), oficistoj difinis regionojn kaj setlejojn, kien romaoj ne devas eniri (§ 10), romaoj povis iam ajn esti oficiale medicine ekzaminataj, vakcinitaj, desinfektitaj, oni povis tondi iliajn hararojn, izolacii ilin kaj sendi en kuracistajn institutojn (§ 11), oni povis eĉ forpreni romaajn infanojn (§ 12).

Bartoloměj estis la plej juna el familianoj. Li finis kvin klasojn de baza lernejo kaj du jarojn studis en mezlernejo. Tiam oni ne atendis, ke romaa knabo estos tre edukita, sed loka instruisto Bartolomějon laŭdis atentigante liajn gepatrojn, ke ilia filo estas inteligenta kaj bona lernanto. Sed familio ne havis sufiĉe da mono por apogi studadon de Bartoloměj.

„En okcidenta Slovakio vivo de romaoj ne estis same malfacila kiel en Bohemio, Moravio aŭ en orienta Slovakio. Iam en Šaštín staris de kdu dometoj, en kiuj loĝis ĉirkaŭ tri cent romaoj. Ni konstruis grandajn domojn, brikajn, ne adobajn. Novajn domojn... Neromaoj loĝis ĉirkaŭ ducent metrojn de romaa setlejo... Niaj romaoj estis laboremaj, ĉiusemajne ili ŝparis iom da mono, pro tio ili disponis per iu ŝparaĵo. Ion ili lombardis – kaj pro tio ili kapablis konstrui siajn brikajn domojn. Ni posedis grandan domon kun granda kuirejo kaj granda ĉambro. Tie ni loĝis, entute naŭ personoj: gepatroj, kvin knaboj kaj du knabinoj, miaj fratinoj... Plej ofte ni ellitiĝadis frumatene, oni de malproksime aŭdis, ke iu per martelo batas amboson, tio estis maljuna Kryštof, nun jam mortinto, kiu forĝis najlojn. En Šaštín ambaŭ fratoj de mia patro, Kryštof kaj Mišo, estis forĝistoj – ankaŭ mia frato Matěj estis forĝisto. Sed li loĝis en Kuchyň apud Malacky. Ili iradis en foiron vendi al bienmastroj ĉenojn, fikskrampojn, pordhokojn, hakfosilojn, ŝovelilojn kaj ŝpatojn. Nuntempa junularo eĉ ne scias, pere de kiu honesta laboro antaŭaj romaoj gajnis monon. Laŭ mia rememoro, en nia regiono Polákoj, Ferjenčíkoj, Růžičkoj kaj Malíkoj estis muzikistoj. Ili ĉiuj bonege konis muzikon... Niaj romaoj estis laboremaj, honestaj, pro tio neniu romaa familio suferis de malsato. Ankaŭ niaj bienmastroj kutimiĝis kun ni kunvivi. Pro tio kiam en la kvardekaj jaroj oni ordonis, ke oni devas sendi romaojn en punlaborajn koncentrejojn, de ni oni prenis eĉ ne unu romao. Notario kaj vilaĝestro diris: „Ĉi tie oni kun ciganoj devas fari nenion! Ili estas bonaj laboristoj kaj kaŭzas nek malbonojn nek malagrablaĵojn.“... Oni min ne soldatigis, ĉar mi studis en mezlernejo kaj krom tio mi ankaŭ laboris. Ĉe ni oni lasis romaajn infanojn lerni en lernejo, kvankam lerneja direktoro gardistiĝis... La 4an de majo 1945 rusoj alvenis. Amaso da rusoj alvenis. Mi ilin observis, kiel ili iras sur ĉevaloj, piede, sur tankoj. Ili alvenis al ni, sed estis tre bonaj homoj. Du oficiroj estis romaoj. Ili kun mi romae parolis. Ili parolis kun rusa akcento, sed ni komprenis unu la alian. Unu romaa suboficiro devenis el Rumanio kaj parolis preskaŭ same kiel ni. Li diris: „Vi estas malriĉuloj, sed ni, romaoj loĝantaj en Rumanio, havas la samajn kampajn parcelojn kiel neromaoj!“ Li devenis el Transilvanio. Unu el tiuj ruslandaj romaoj estis inĝeniero kaj alia instruisto. Kleruloj. Ni studis en mezlernejo, mi kaj mia frato. Aliaj romaoj ne studis. Kiam mi vidis, kiujn signifajn laborpostenojn tiuj du romaoj akiris kaj kiel kleraj homoj ili estis, tio min tre inspiris, por ke ankaŭ mi studu.“

En la jaro 1942 lia patro mortis de tuberkulozo, pro tio Daniel devis forlasi lernejon kaj gajni monon por tuta familio. Post morto de patro li transprenis lian laboron de komunuma salajrulo kaj helpis al sia malsana patrino. Li balais placon, disportis poŝtaĵojn, alportis al notariino lakton el arbarista domo kaj okupiĝis pri aliaj okazaj laboroj. Bonŝance lia familio evitis holokaŭston (labora barakaro en Dubnica nad Váhom, masakroj de romaoj, kiun faris germanaj kaj slovakaj faŝistoj). Al sia lernado Daniel povis reveni nur post la dua mondmilito.

Ĉefa ŝanĝo de lia sorto estis armea servo. En la jaro 1946 li soldatiĝis en Dačice kaj poste servis en Jihlava kaj Olomouc. Armea servo (1946-1948) ne estis facila, ĉar li unuafoje forlasis sian familion. Ni ne forgesu, ke por okcidentslovakia romao ĉeĥa lingvo estis fremda lingvo. Bonŝance en Olomouc li amikiĝis kun instruisto Procházka, lia edzino, kiu estis tradukistino kaj iliaj du infanoj, kiuj studis en la universitato. Tiuj homoj lin tre influis, ĉar ili al li pruntedonis librojn, konatigis lin kun literaturo, prenis lin en teatron. Bartoloměj bone ellernis **ĉeĥan lingvon** kaj mem lernis **germanan kaj rusan lingvojn kaj esperanton**. En tempo, kiam multe da romaoj eĉ bone ne sciis ĉeĥan lingvon, Daniel lernis kvar fremdajn lingvojn!

Post fino de armea servo li eklaboris en ŝtata bieno en Prago, kie oni lin elektis por studado en vespera Mezlernejo Beneš en Prago-Dejvice. Tio estis prepara lernejo por laboranta junularo, kiu poste povis fariĝi universitatoj. En la jaro 1950 Daniel trapasis abituriantan ekzamenon kaj ekstudis ĉeĥan historion kaj arĥivadon en Filozofia Fakultato de la Karola Universitato en Prago.

En la jaro 1952 li edziĝis. Lia fianĉino Marie devenis el vilaĝo Kopčany. Daniel respektis romaajn kutimojn. Pri geedziĝo traktis lia patrino, kiu elektis lian fianĉinon. Tio signifas, ke li respektis romaajn tradiciojn.

Ekde la jaro 1956 li du jarojn estis arĥiva referento de ministerio de internaj aferoj. Sed kaŭze de siaj opinioj pri politika situacio kaj eĉ konfliktoj kun polico li devis ŝtatan administraron forlasi kaj labori en metalurgia uzino en Regiono Kladno kaj poste ekzemple kiel bibliotekisto kaj arĥivisto en Ĉeĥa Asekurejo.

En la jaro 1964 li povis translokiĝi en Pragon, kie li laboris en tagaj kaj noktaj laborperiodoj en presejo Mír (Paco), kie oni presis semajngazeton Práce (Laboro).

En la jaroj 1969-1973 li estis agema en fondita Asocio de Ciganoj-Romaoj (Svaz Cikánů-Romů). Pro tio li translokiĝis el Prago en Brnon.

En la jaro 1970 li aranĝis unikan ekspozicion pri romaa forĝado.

„... En tiu tempo – en duono de la jaro 1969 – Asocio de Ciganoj-Romaoj de ĈSR kreiĝis kaj formiĝis laŭ partia tendenco, akceptante precipe instigojn de romaoj mem, sed ĉe ĝia naskiĝo **la ĉefan voĉon havis Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio (KPCĈ)**, kiu tute mallarĝe limdifinis amplekson de ĝia aktiveco determininte ankaŭ enhavon de ĝia agado... Per tiu ĉi politika kaj socia ago – fondado de Asocio de Ciganoj-Romaoj – politiko de KPCĈ intencis antaŭ publiko konfirmi sian celadon, ke ĝi kompatas ankaŭ romaan loĝantaron, kaj samtempe naski iluziojn, etoson subtenantan la ideon, ke tiel nomata normalizado necesas por solvo de amasiĝintaj problemoj, kiujn oni prezentis dum la kongreso. Tio signifas, ke KPCĈ konsentis kun fondo de la organizo kondiĉe, ke **romaoj nur p a r t u m o s** en solvo de romaa problemaro kune kun ŝtataj organoj en limoj kaj tre limita amplekso, kaj tio klare montris ne nur ĝian karakterizon, sed ankaŭ realigon de ĝiaj agadoj. Kaj kaŭze de tio Asocio de Ciganoj-Romaoj de ĈSR **perdis eblecon iel principe influi** vivajn, socialajn kaj kulturajn kondiĉojn de romaa vivo.”

„Asocio pere de sia ĉiufanka eduka laboro instigis romaan homamason pensi pri ilia socia rango tiel, ke ĝi ilin instruis organizi sin, politike, publike engaĝiĝi por komuna afero, netimi sin publike prezenti siajn opiniojn pri iu ajn problemoj. La Asocio movigis multe da antaŭe postigintaj romaoj, kiuj loĝis en rando de socio, kaj liberigis ilin el izoleco, devigis ŝtatajn organojn neniigi romaajn setlejojn en randoj de urboj kaj vilaĝoj...”

„Vere neenviinda situacio kaptis Asocion de Ciganoj-Romaoj, el unu flanko premo de ordinaraj romaoj, kiuj postulis rebonigon de sia socia rango, kaj el alia flanko premo de ŝtataj organoj, kiuj en kelkaj evoluaj etapoj de Asocio de Ciganoj-Romaoj subfosis ĝian aŭtoritaton, kio fine kaŭzis ĝian nuligon.”

„Asocio de Ciganoj-Romaoj... premis kaj preskaŭ alpuŝis kompetentajn organojn, por ke pri romaa problemaro okupiĝu Ĉeĥoslovakia Akademio de Sciencoj. Rezulto estis fondado de scienca laborejo ĉe Sociologia Instituto de Ĉeĥoslovakia Akademio de Sciencoj en Prago, kiu dum tempo de sia ekzisto en la jaroj 1970 – 1974 signife kontribuis al baza esploro de romaa problematiko konsiderante de sociologio...”

Danke al intensa kunlaboro kun tiu ĉi scienca laborejo en la jaro 1971 Asocio de Romaoj – ĝia estraro gvidata de inĝeniero Miroslav Holomek kaj d-ro Tomáš Holomek prezentis al partiaj kaj registaraj organoj Memorandon, kiu postulis statuton de romaa nacieco. Bedaŭrinde superaj ŝtataj organoj kaj Nacia Fronto tiujn ĉi rajtigintajn postulojn de romaoj rezolute kaj unusence malakceptis. Sed aliflanke ili ne hontis decidi pri romaoj sen romaoj, kiel ekz. dum balotado en la sama jarto, kiam 350 000 – 400 000 romaajn loĝantojn – iliajn voĉojn komunistaj deputistoj misuzis por sia profito. Nur en tempo, kiam oni fakte decidis pri nuligo

de la Asocio, oni kooptis en poziciojn de deputistoj de Nacia Asembleo inĝenieron Miroslavon Holomekon kaj d-ron Tomášon Holomekon.“

„Asocio de Romaoj eldonis ankaŭ sian propran gazeton „Romaan Gazeton“ („Romano l'il“), por pere de ĝi influu romaan loĝantaron kaj lokajn, distriktajn kaj regionajn organizojn. Konsiderante tion, la gazeto ludis signifan rolon. Ĉe ĝia kapo estis redaktoro Pavel Steiner, kiun pro ĝiaj entusiasmo kaj laboremeco ekfavoris ĉiuj romaoj... Dum fina, memorinda neniiga renkontiĝo en Prago, kiam reprezentantoj de KPCĈ nin konatigis kun decido nuligi Asocion de Romaoj, mi kune kun Pavel Steiner mi malakordis kontraŭ la decido. Al adresoj de partiaj kaj ŝtataj organoj mi inter alie diris, ke tiuj superaj organoj devis prefere danki al la Asocio pro tiu granda kaj responda politika-kleriga laboro ol ĝin puni... Pro tiu ĉi mia opozicia starpunkto dum tuta tempo de totalismo oni min ĉikanis – nenie mi povis trovi laboron – profesion adekvatan al mia edukiteco, malgraŭ ke origine oni min planis por laboro en Etnografia Instituto de Moravia Muzeo en Brno. Tielmaniere plenajn dudek jarojn al mi eksa komunisma reĝimo malebligis labori en mia fako, ankaŭ pro tio, ke mi neniam fariĝis membro de KPCĈ kaj neniu alia politika partio.“

La 8an de aprilo 1971 en Orpington apud Londono reprezentantoj de romaoj de 14 landoj (inkluzive de tiama Ĉeĥoslovakio) akceptis **la nomon romaoj, romaan himnon kaj romaan flagon.**

En la jaro 1973 komunistaj regantoj Asocion de Ciganoj-Romaoj nuligis kaj kelkaj ĝiaj membroj disidentiĝis. Unu el ili estis edukita romao Bartoloměj Daniel. Lia kolekto de forĝistaĵoj malaperis.

Post neniigo de Asocio de Ciganoj-Romaoj li laboris en diversaj metiistaj profesioj. Ĝis la jaro 1987 li laboris en kolekto de reuzeblaj materialoj, eĉ tri jarojn post sia emeritiĝo. Inter multaj paperoj por recikligo li trovis kelkajn rarajn presaĵojn, kiuj enhavas signifajn indikojn pri kulturo kaj historio de romaoj. Mallonge li purigis en studenta manĝejo.

Al laboro de historiisto li revenis nur post la jaro 1989, kiam li povis publikigi en la ĵurnalo Romano l'il. En la jaro 1991 li kunfondis Muzeon de Romaa Kulturo, en kiu ĝis fino de sia vivo laboris kiel historiisto. Oni kapablis trovi plimulton da eksponaĵoj de kolekto de forĝistaĵoj, kiuj nuntempe estas en Muzeo de Romaa Kulturo.

Bartoloměj Daniel estis ankaŭ talentita poeto, kiu verkis poemojn en okcidentslovakia dialekto de romaa lingvo:

### Bartoloměj Daniel

#### Khiljav

Ĥude, ĉhaje, ĥude,  
jepaŝ phabaj, jepaŝ khiljav,  
nane man njiko,  
nalaĉhes me ĝivav.

Ĥude, ĉhaje, ĥude,  
jepaŝ phabaj, jepaŝ khiljav,  
tav mange ĥumer khiljavence,  
kaj me tuha laĉhes me ĝivav.

Ĥude, ĉhaje, ĥude,  
jepaŝ phabaj, jepaŝ khiljav,  
av ke mande, av ke mande,  
phená tuke phená,  
hoj tut kamav,  
hoj pal tute trin berŝ phirav.

#### Pruno

Prenu, knabino, prenu,  
duonon da pomo, duonon da pruno,  
mi havas neniun,  
mia vivo estas malbona.

Prenu, knabino, prenu,  
duonon da pomo, duonon da pruno,  
bonvolu baki prunan kukon,  
por ke mia vivo kun vi estu bona.

Prenu, knabino, prenu,  
duonon da pomo, duonon da pruno,  
mi al vi diros,  
ke mi amas vin jam tri jarojn  
kaj pri neni aliuino  
mi sopiras.

(Libere O. A. Fischer esperantigis.)

Fondado de Muzeo de Romaa Kulturo (1991) ne estis facila. Post naŭ jaroj de funkciado en provizoraj kondiĉoj kelkaj entuziastoj ricevis duonruinigitan domaĉon, kie antaŭe tranoktadis senhejmuloj kaj narkotuloj. Bartoloměj Daniel eklaboris kiel historiisto kun duona devoligo.

„En lernejo romaa infano pri historio de romaoj ekscias tute nenion. En ĉeĥa infano oni ekde infanaĝo evoluigas fieron pri sankta Venceslao, Karolo la 4a, Magistro Johano Hus, Jan Žižka kaj plua kaj pluaj. Ekde la unua klaso ĝi per maniero, kiu estas atingebla laŭ ĝia aĝo, konatiĝas kun historio de sia nacio. Tiel ĝi ricevas ankriĝon kaj apogon, ĉe kiuj ĝi povas gajni novajn fortojn por serĉado de sia propra identeco. Homo, kiu havas neniun informon pri sortoj de lia etna komunumo estas kiel flugetanta folio, kiu ne scias de sur kiu arbo ĝin vento fortiris kaj kien ĝin portas.“

Kiel lingvisto Daniel gardis purecon de romaa lingvo. Li kritikis anstataŭon de konataj romaaj vortoj per alilingvaj elpruntaĵoj.

Kiam aperis Romaa-ĉeĥa kaj ĉeĥa-romaa poŝvortaro, Daniel publikigis sian kritikon sub karese humura titolo „Romaa lingvo ekploris“.

En gazeto Ĉeĥa Literaturo Daniel estis publikigis siajn komentojn de romaa kanto en romano Ciganoj (Cikáni) de Karel Hynek Mácha kaj romaa teksto en teatraĵo La Rabisto (Loupežník) de Karel Čapek.

„Kaj tio estis ĝuste romaa lingvo, per kiu interkompreniĝis romaoj el diversaj eŭropaj landoj, por fronti kontraŭ genocido, kies kaŭzanto estis hitlerisma faŝismo, jes, tio estis romaa lingvo, kiu unuigis ĉiujn romaojn sendepende de ilia sociala aŭ politika aparteneco en la situacio, kiam ĉiuj suferis, maljunuloj, virinoj kaj infanoj.“

Bartoloměj Daniel, la 25an de novembro 1998

Bartoloměj Daniel romaigis preĝojn Patro Nia kaj Ave, Maria. Li estis kredanto kaj havis bonajn rilatojn al romkatolika eklezio.

„En la jaro 1994 Pedagogia Fakultato de la Universitato Palacký en Olomouc eldonis lian monografion Dějiny Romů (Historio de Romaoj). Oni la libron aprezis precipe pro ĝia populariganta kontribuo. Sed lia esteca rilato al romaa indenteco, la romeco, oni sentas ne nur en tiu ĉi verkaĵo. La unua romaa historiisto en landoj de Ĉeĥio, modesta kaj laborema homo, fiera romao.“

Bartoloměj Daniel vizitadis Muzeon de Romaa Kulturo ĝis fino de sia vivo. Vendrede la 9an de novembro 2001 li lastfoje adiaŭis de siaj kolegoj. Ekverkita artikolo sur lia tablo jam restis nefinita.“

Alica Sigmund Heráková, 2021

Li forpasis **la 10an de novembro 2001** en sia loĝejo en Brno.

En la jaro 2021, post sia morto, Bartoloměj Daniel ricevis Prezon de Muzeo de Romaa Kulturo.

„Li estis vera reviviganto, kiun romaoj amis, ĉar li kapablis pe siaj rakontojn el romaa historio homojn entusiasmi. Mi opinias, ke li apartenis al genro de *paramisaroj*, fabelistoj, ĉar li kapablis altire rakonti pri la historio. Ĝis hodiaŭ ili pri li rakontas kaj ŝatas lin, kaj tio estas bone.“

D-rino Jana Horváthová

**Aŭtoro dankas al doktorino Jana Horváthová, magistrino Tereza Richtáriková, bakalaŭrino de artoj Simona Šreková kaj magistrino Jitka Senčuch el Muzeo de Romaa Kulturo en Brno por dono de informoj.**

## Rekomendita literaturo

- ČAPEK, K. 2005: Loupežník. Komédie o třech dějstvích. 1a eld., Pago, Artur, 93 paĝoj.
- DANIEL, B. 1956: Příspěvky k dějinám Cikánů v českých zemích do poloviny XVIII. století. Diploma laboro numero 628. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 5600491.
- DANIEL, B. 1991: Poznámky k činnosti bývalého Svazu Cikánů-Romů ČSR v letech 1969-1973. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 18/91.
- DANIEL, B. 1991: Překlady modliteb Otče náš a Zdravas, Maria do romštiny. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 33/91.
- DANIEL, B. 1993: Romština zaplakala... O vydání česko-romského slovníku, pliiĝa numero: 7/2004/3-P 1240.
- DANIEL, B. 1994: Dějiny Romů. 1a eld., Olomouc, Pedagogická fakulta Univerzity Palackého v Olomouci, 199 paĝoj.
- DANIEL, B. 1997: Romská píseň v Máchových Cikánech. Česká literatura 45 (1): 85-89.
- DANIEL, B. 1997: Karel Čapek a Romové. Česká literatura 45 (3): 331-332.
- DANIEL, B. 1998: Geschichte der Roma in Böhmen, Mähren und der Slowakei. 1a eld., Frankfurt am Main, P. Lang, 221 paĝoj.
- DANIEL, B. 1998: Přčteno v rozhlase v Brně. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 271/99.
- DANIEL, B. 1999: Romská katolická pouť do Oseku. La 4an de julio 1999. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 154/99.
- DANIEL, B. 1999: Vztahy katolické církve k Romům v Brně. La 19an de aŭgusto 1999. Muzeo de Romaa Kulturo en Brno, pliiĝa numero: 162/99.
- DEMETER, F., DANIEL, B., FABIÁN, V., FABIÁNOVÁ, T., LACKOVÁ, E., PEŠTA, O., HÜBSCHMANNOVÁ, E. & SLOUP, V. 1979: Romské písně. Sborník romské poezie. – Romane gi'la. Gend'i romaňa poeziatar. 1a eld., Prago, Obvodní kulturní dům v Praze 8, 61 paĝoj.
- DIENSTBIEROVÁ, K. 2009: Před padesáti lety byl založen Svaz Cikánů-Romů. [https://romea.cz/cz/domaci/pred-padesati-lety ...](https://romea.cz/cz/domaci/pred-padesati-lety...) 2019-08-30.
- FRYDRÝŠKOVÁ, K. 2011: Romové pod vlivem komunismu. [https://www.romanovodori.cz/etno/romove-pod-vlivem-komunismu ...](https://www.romanovodori.cz/etno/romove-pod-vlivem-komunismu...)2011-05-11.
- HORVÁTHOVÁ, J. 1998: Základní informace o dějinách a kultuře Romů. 1-a eld., Prago, Ministerstvo školství, mládeže a tělovýchovy, 49 paĝoj.
- HORVÁTHOVÁ, J. 2002: Kapitoly z dějin Romů. 1-a eld., Prago, Nakladatelství Lidové noviny, 84 paĝoj.
- HORVÁTHOVÁ, J. 2025: Ĉapitroj el Romaa Historio. 1-a eld., Brno, MSD, 125 paĝoj.
- HÜBSCHMANNOVÁ, M. 2005: Po Židoch Cigáni. 1a eld., Prago, Triáda, 898 paĝoj.
- HÜBSCHMANNOVÁ, M., ŠEBKOVÁ, H. & ŽIGOVÁ, A. 2001: Romsko-český a česko-romský kapesní slovník. 2a eld., Prago, Fortuna, 656 paĝoj.
- JAMNICKÁ, Z. 1955: Dějiny našich Cikánů. 1a eld., Praha, Orbis, 114 paĝoj.
- JELÍNKOVÁ, N. 2026: „Odvezeme vás do nemocnice.“ Masakr v romském táboře v Dubnici nad Váhom 23. 2. 1945. <https://medium.seznam.cz/clanek/nina-jelinkova-odvezeme-vas...>
- JILO, O. 2026: Romský lékař Jakub Jarý: Cesta k lepšímu životu vede přes vzdělání a práci, žádné zkratky nepomohou. <https://medium.seznam.cz/clanek/o-jilo-romsky-lekar...> – 2026-03-31.
- MÁCHA, K. H. 2000: Cikáni. 1a eld., Prago, Otakar II., 168 paĝoj.
- MIKO, V. 2024: Bartoloměj Daniel – první romský historik v Československu. <https://blog.idnes.cz/miko/bartolomej-daniel-prvni-romsky-historik-v-ceskoslovensku.Bg 24070282.> – 2024-07-12.
- SADÍLKOVÁ, H. 2025: Osudy popravených Romů stojí ve stínu představ o holokaustu, míní romistka. <https://www.irozhlas.cz/veda-technologie/historie/osudy-popravenych-romu...> 2025-02-22.
- SCHEINOSTOVÁ, A. 2009: Význam časopisectví v romské literatuře (Zpravodaj Romano l'il 1970-1973). <https://www.iliteratura.cz/clanek/24601-vyznam-casopisectvi-v-romske-literature-2009-01-06.>
- SOLAŘIKOVÁ, I. 2021: Lidé o Romech nic nevědí, jen mýty a stereotypy, říká ředitelka muzea. <https://www.idnes.cz/brno/zpravy/jana-horvathova-muzeum-romske-kultury-vyroci...> 2021-02-26.
- ZDARILOVÁ, E. 2018: Politická angažovanost Romů před revolucí: Svaz Cikánů-Romů nebyl začátkem, ale vyvrcholením. <https://romea.cz/cz/zaostreno/politicka-angazovanost...> 2018-06-08.
- Zákon č. 74/1958 Sb., o trvalém usídlení kočujících osob.
- Zákon č. 57/1998 Sb., kterým se zrušuje zákon č. 74/1958, o trvalém usídlení kočujících osob, ve znění zákona č. 175/1990 Sb.

**Muzeum romské kultury  
Muzeo de Romaa Kulturo  
Strato Bratislavská 246/67  
CZ – 602 00 Brno  
Ĉeĥa Respubliko**

Telefonaj numeroj: **+420 545 581 206; +420 778 761 848 / akceptejo.**